



PENSEO

N-ro 220

feb. / 2010

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 21-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Guozhu (Ĉinio)

Naskiĝtage 2010

(2010-02-03)

— laŭ ĉinesko Yongyuyue*

Naskiĝtaga/ datreveno/ en kvieto
primavera/ proksimiĝas./ Ĉu nur ripeto
per muziko, / ovokuko,/ aŭ franda kotleto?
Orgio/ estu for de/ piema asketo!

Kio plaĉas/ kaj ĝojigas/ al verda poeto
estas frukto/ de versado/ en kabineto
ke eLibro/ novfarita/ jam estas en preto
kaj baldaŭ/ aperos en/ interreto!

Vejdo (Ĉinio)

Poemdonaco

okaze de la naskiĝtago 2010 de Guozhu

—laŭ ĉinesko Yongyuyue*

antaŭ jaroj
vi dissemis
en diskreto
en ĝardeno
de ĉineskoj
por san-vegeto
laboreme
vi kultivas
plantidojn kun preto
volante
ke plenkresku
ili kun koketo

nun jam staras
altaj arboj
kiel minareto
kun densaĵo
de folioj
pen' kun impeto
rekompencas
jam vin riĉe
per laŭda almeto
jen bona
or-pokalo
por poeto



Cindy Mckee (Usono)

Modelo

en la naskiĝtago 2010 de Guozhu

—laŭ ĉinesko Yongyuyue

la kuraĝon
vi elmontris
nin inspiras
Kaj ni vidas
vojon kiun
vi pioniras,

tra branĉoj de
kontraŭstaro
kiujn vi forŝiras
poete
Esperante
freŝ-voje vi iras

bonekzemple
ĉe la fronto
aliajn vi tiras
pli kaj pli da
ĉineskaĵoj
ĉiuj akiras
pli kaj pli da
sentimeco
ni pro vi aspiras
Modelo,
daŭru longe
ni deziras!

Lily (Ĉinio)

Poet' sen sekret'

dediĉe al Guozhu je lia naskiĝtago 2010

—laŭ ĉinesko Yongyuyue

la riĉaĵon
vi kolektas
nia poet'
en la ĝarden'
de ĉineskoj
ne la monan sed
la spiritan
vi nun faras
rikoltadon kun pret'
pro tio
ke vi verkas
senĉese kun ripet'

diligento
laboremo
estas via sekret'
vi talenta
ĉineskisto

kun tuta posed'
de verkarto
ĉiam verkas
poemas sen forĵet'
vi vere
'stas modela
nia portret'



* *Yongyuyue* (Ĉiama ĝojo de renkontiĝo): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 12 versoj de 444, 445,446,346/ 446,445,446,344 silaboj, laŭ rimaranĝo *xxa,xxa,xxa,xxa* (*x=senrima*)

Henrik Heine(1797-1856)

Amata, ni sidis kune

Amata, ni sidis jen kune,
kvietis ĉe l' boat'.
Ni nokte remis ĉelume
sur vasta akvostrat'.
Fantominsulo la bela
sublune dormis en tranc'.
Jen kanto kara, hela,
moviĝis nebula danc'.
Jam sonis eĉ pli kare,
plaŭdetis jen kaj jen.
Ni preterdrivis surmare
en trist' de l' mar' sen ben'.



tradukis Cezar (Germanujo)

Cezar (Germanujo)

Tro da adoro

Mi mesaĝon ŝin skribu,
pro ŝia ador'.
Ŝi petis retskribe
kun granda fervor'.

Sed kiel komforti
pri tia flatem'?
Prefere senvorti
al tro da sent-em'.

Ne skribi mi volus
pri certa grumblem'.
Se tiel mi rolus,
ekestus problem'.

Prefere silenti,
laŭ mia kompren'.
Por poste ne penti
pro vanta sinten'.

Mi tute ne estas
pli grava ol ŝi.
Poetojn ne vestas
la rolo de di'.



Wang Guozhen (1956-)

Se Nur Ni Amus Unufoje

Se ni ne renkontiĝus,
neniam niaj sentoj pezus senmotive.
Se ni maltrafus la bonŝancon
neniam kvietiĝus ni dumvive.

Nur unu ekrigardo
ciklonon povas levi tra la kor'
pejzaĝon belan komprenigi
sur la sterila tero en angor'

Nur unu ekskursado
magrigo povas koron la gracilan.
Ekvido je rivero la aŭtuna
eltiras larman fluon la facilan

Al morto oni iras ne hasteme,
sed senemocias ne al am-apert'.
Se nur ni amis unufoje,
jen estas senbedaŭra spert'.

Eble

Eble ne ekzistus tia tago:
kiel matenuĝo buntus via onto.
Eble ne ekzistus tia tago:
kiel lustroj lumus via glori-rakonto.
Eble nur ekzistus tia sceno:
Grimpi sen pinton eĉ atingi.
Eble nur ekzistus tia sceno:
Flui sen ajn ondojn svingi.

Eble ni prezenti povos
al vi nur
koron tralavitan de tempo-torent'
vangojn eroditajn per glaci' kaj
vent'.

Mi Ne Volas Rekompencan

Se mi faras donon al vi,
mi ne volas rekompencan.
Se mi pagus
por kovi pet-intencon
kiel sensignifa ja fariĝus mi!

Se vi estus lago,
mi vontontus esti digo ĉirkaŭanta vin.
Se vi estus monto

mi voluntus estis herboj dekorantaj vin.

Hom' fariĝi granda ne certas
sed, jes
sin nobligi li asertas.

elĉinigi **Lily (Ĉinio)**

Cindy Mckee (Usono)

Reveno al juneco

Mi volas skizi korojn sur papero
Mi volas kisi bebojn surstrate
petole telefoni dum vespero
siropajn versojn verki seks-svate

"La jaroj retroiris ĝis utero!"
mi pensas dum mi versas malglate
Ebria amo, la konfesa vero
forŝtelis mian cerbon pirate

Mi ĵetas min ĉe vi, bonvolu kapti
Infanan febron mian frostigu
Tremantan ĉi ĵeleon ostigu

Bubinon grizan nun bonvolu bapti
per amo kaj matura influo--
Karulo! Kia bela tatuoj!



13-14ajn de decembro 2009

Sunleviĝo en tigra jaro

Novradioj de la jaro
tuŝas herbpintojn en savano
aŭrore roras tigra nano
prove tiras al sunĉaro

Super ĉiu herboharo

dancas espera diafano
novradioj de la jaro
tuŝas herbpintojn en savano

Tiru tigro, januaro
ŝanceliĝas, kiel infano
sed poste kuros karavano.
Tigraj strioj tra herbaro

novradioj de la jaro



Minosun (Ĉinio)

Vino—Mia Kompano

mi kaj vi
vi kaj mi
mi ne ekparolas
ĉiam vi silentas...
sed vi jam vanuis
kaj mi nur lamentas...

2010-1-29

Ĉineske

Guozhu (Ĉinio)

Persista Esp-igo de Liaozhai

— laŭ ĉinesko Manjianghong*

(2010-01-30)

Antaŭ dekoj/ da jaroj/ la ĵurhoru
ankoraŭ/ freŝas ĝis nun/ en memoro:
Traduki plenan 'Liao Zhai'/ por la patruja
gloro,
spite al/ mil baroj, ek al/ laboro!

**Sen sorta/ favoro,
kun arda/ adoro,
ĉiam persisti/ kun fervoro,
en transgeneracia/ stafeta kunlaboro
konkorde/ kun la genia/ aŭtoro!**

**Manjianghong (Rivero plenruĝa): ĉina fiksfoma
poemo el du strofoj po 11 versoj de 434, 344, 77, 353
/ 33, 33, 54, 77, 353 silaboj respektive, laŭ rimaranĝo
xxa,xxa,xa,xxa / xa, xa, xa,xa,xxa (x = senrima)*

Sero (Ĉinio)

La Tero Tumultas

okaze de granda tertremo de Haitio
—laŭ ĉinesko Daolianzi (kanto de lavantino)

**la tero
tumultas
insulanoj ekstultas
domoj falas lavange
kaj loĝantojn sepultas**

**viktimoj
plimultas
virinoj plorsingultas
viroj senvorte turnas
sin al dio kaj kultas**



**Daolianzi (kanto de lavantino): ĉina fiksfoma
poemo el 5 versoj de 33,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo
xa, a, xa (x=senrima)*

Cindy Mckee (Usono)

Nia diurno

—laŭ ĉinesko Zhuzhici (Bambuoj)

**birdo flugas inter ni
flugas laŭ trajektori'
kun oro de la suno
flugas al lunpozici'**

**birdo portas inter ni
portas de sunincendi'
orfajron al palnokto
portas varmon al glaci'**

**birdo trenas inter ni
trenas amon en radi'
kun palo de la luno
trenas roson al Heli' (Helios)**

**lumradioj en tensi'
reciproka rotaci'
ni fluas kaj flugas en
antipoda simetri'**

**Zhuzhici (bambuoj): ĉina fiksfoma poemo el kvar
versoj de sep silaboj laŭ rimaranĝo a, a, xa
(x=senrima)*

Tempo en la urbo

—laŭ ĉinesko Dingfengbo

**lumiĝas betonbestoj
kun homoj en intestoj,
organika dekokto
Nokto
falos ni post digestoj**

**trafiko fluis onte
fonte
el ŝtalo kaj betono
porta, pasiva ago
Tago
bestoj turas en fono**

**Dingfengbo (subigo de ŝtormo): ĉina fiksfoma
poemo el du strofoj kun 5 kaj 6 versoj respektive de
7,7;7,2;7;/ 7,2;7,2;7; silaboj, laŭ rimaranĝo
aabba/ccdeed*

*** *** ***

La lasta leciono

de **Alfonso Daudet**

Frantzo estas malgranda knabo, kiu same al ĉiuj samaĝaj infanoj vizitas la lernejon. Ni estas en la jaroj 1870-1871, dum la milito inter Prusio (eks-Germanio) kaj Francio. Dum tiu turmentata periodo de la Franca historio, la Prusoj jam invadis tiun parton de Francio, kiu estas proksima de la landlimo. Iun matenon, Frantzo rakontas :

Tiun matenon mi malfruegis por iri al la lernejo, kaj mi timegis esti skoldota, des pli, ke Sro Hamelo estis dirinta al ni ke li parole ekzamenos nin pri la participoj, kaj mi ne sciis eĉ la unuan vorton pri tio. Dum momento, la ideo alvenis al mi delasi la lernejon, kaj kuri tra la kampoj.

La vetero estis tiom varma, tiom hela !

Oni aŭdis la merlojn, kiuj fajfis ĉe la arbarorando, kaj en la herbejo Riperto, malantaŭe la segejo, la Prusojn kiuj ekzerciĝis. La tuto tentis min pli multe ol la regulo de la participoj; sed mi sukcesis rezisti, kaj mi tre rapide kuris al la lernejo.

Preterpasante la urbodomon, mi vidis ke estis uloj staritaj apud la malgranda kradaĵo de la afiŝejo. De antaŭ du jaroj, estas de tie, kie ĉiuj malbonaj novaĵoj alvenis: la perditaj bataloj, la rekvizicioj, la ordoj de la prusa milita komando; kaj sen halti mi pensis:

« Kion ankoraŭ okazas ? »

Tiam, kiam mi kurante trapasis la placon, la forĝisto Vaĉtero, kiu estas tie akompanita de sia metilernanto, legante la afiŝon, kriis al mi :

– « Ne tiom rapidas, etulo, vi ĉiam sufiĉe frue alvenos al via lernejo ! »

Mi kredis ke li mokis min, kaj mi tute spirmanka eniris en la malgrandan korton de Sro Hamelo.

Ordinare, ĉe la komenco de la instruado, estis granda bruado, kiun oni aŭdis ĝis en la strato,

la pupitroj kiujn oni malfermis kaj fermis, la lecionoj kiujn oni laŭtege ripetis ĉiuj kune, ŝtopante al ni la orelojn por plibone lerni, kaj la dika rektilo de la instruisto, kiu frapis sur la tablojn:

– « Iom da silento, mi vin petas ! »

Mi esperis tiun tutan brukriadon por iri al mia benko sen esti vidita; sed ĝuste tiu tago, la tuto estis kvieta, kiel matene iun dimanĉon. Tra la malfermita fenestro, mi vidis miajn kamaradojn, jam sidantaj ĉe siaj lokoj, kaj Sron Hamelo, kiu pasis kaj repasis, kun la terura fera rektilo subbrake. Estis necese ke mi malfermu la pordon, kaj eniru meze de tiu granda kvieto. Vi imagas, kiom mia vizaĝo ruĝiĝis, kaj kiom mi timis !

Nu ! tute ne. Sen kolero, Sro Hamelo rigardis min, kaj tre milde diris al mi :

– « Iru rapide al via loko, mia eta Frantzo, ni tuj ekos sen vi. »



Mi transpaŝis la benkon, kaj mi tuj sidiĝis ĉe mia pupitro. Nur tiam, iom resereniĝita, mi ekrimarkis ke nia instruisto estis surmetinta sian belan verdan redingoton, sian fajnan plisitan ĵaboton, kaj la vertoĉapon el nigra brodita silko, kiun li nur surmetis en la tagoj de inspektado aŭ premidistribuo. Cetere, la tuta lernejo havis ion eksterordinaran kaj solenan. Sed kio plue mirigis min, estis vidi funde de la klasoĉambro, sur la benkoj kiuj kutime restis vakaj, homojn de la vilaĝo sidantaj kaj silentaj kiel ni, la maljunan Haŭsero kun sia trikorna ĉapelo, la eks-urbestron, la eks-leterportiston, kaj ankoraŭ aliajn personojn. Tiu tuta mondo ŝajnis malgaja, kaj Haŭsero estis kunportinta malnovan abocolibron, kies flankoj estis

manĝitaj, kaj kiun li surgenue entenis tute malfermita, liaj dikaj okulvitoj metitaj tra la paĝoj.

Dum mi miris pri la tuto, Sro Hamelo estis suprenirinta en sian katedron, kaj per la same milda kaj grava voĉo, kun kiu li ĵus akceptis min, li diris al ni:

– « Miaj infanoj, estas lastfoje ke mi instruas vin. La ordono alvenis el Berlino, nur instrui la germanan lingvon en la lernejoj de Alzaco kaj Loreno... La nova instruisto alvenos morgaŭ. Hodiaŭ estas via lasta franca leciono. Mi vin petas, bone atentu ! »

Tiuj kelkaj paroloj emociigis min. Ha! la indigninduloj, jen kion ili estis afiŝita al la urbodomo.

Mia lasta franca leciono !...

Kaj mi, kiu apenaŭ sciis skribi! Mi do neniam lernos! Do necesos ne iri pluen!... Kiom nun mi riproĉis al mi la perditan tempon, la mankitajn instruadojn por viziti la nestojn, aŭ gliti sur la Saaro! Miaj libroj kiujn, estas momento, mi trovis tiom enuigaj, tiom pezaj por alporti, mia gramatika libro, mia libro de sankta historio, nuntempe ŝajnis al mi maljunaj amikoj, kiuj multe afliktos min delasi ilin. Estas same pri Sro Hamelo. La ideo ke li tuj foriros, ke mi ne plu vidos lin, forgesigis al mi la punojn kaj la rektilfrapojn.

Kompatinda homo!

Honore al tiu lasta leciono, ke li estis surmetinta siajn belajn vestaĵojn de la dimanĉo, kaj nun mi komprenis kial tiuj maljunuloj de la vilaĝo sidiĝis funde la klasoĉambro. Tio ŝajnis diri ke ili bedaŭris ne estis venintaj plej ofte, en tiun lernejon. Estis ankaŭ maniero danki nian instruiston pro liaj kvardek jaroj da bonaj servoj, kaj plenumi siajn devojn al la patrujo kiu foriris...

Tiam mi estis pripensinta pri tio, mi aŭdis mian nomon alvokita. Estis miavice ke mi recitu. Kiom mi estus doninta por povi plene diri tiun faman regulon pri la participoj, bone laŭte, bone klare, sen nenia eraro, sed mi

konfuziĝis ekde la unuaj vortoj, kaj mi restis staranta, balancante min en mia benko, la koro peza, senkuraĝe levi la kapon. Mi aŭdis Sron Hamelo kiu parolis al mi :

– « Mi ne skoldos vin, mia eta Frantzo, vi devas jam esti sufiĉe punita... jen kio estas. Ĉiutage oni sin diras : Ba! mi ja havas tempon. Mi lernos morgaŭ. Kaj poste vi vidas kion okazas... Ha! Estis la granda malfeliĉo de nia Alzaco, ĉiam al morgaŭ remeti sian instruadon. Nun tiuj uloj rajtas diri al ni: Kiel! Vi pretendas esti Francoj, kaj vi ne scias, nek paroli, nek skribi vian lingvon!... Pri tio, mia kompatinda Frantzo, ne estas ankoraŭ vi la pli kulpa. Ni ĉiuj havas nian bonan parton da riproĉoj fari al ni.

– « Viaj gepatroj ne sufiĉe tenis vidi vin instruitaj. Ili pli bone ŝatis vidi vin labori la teron aŭ en la ŝpinejoj, por gajni kelkajn pliajn soldojn. Mi mem, ĉu mi nenion havas por riproĉi al mi? Ĉu mi ofte akvumigis al vi mian ĝardenon anstataŭ labori? Kaj kiam mi volis fiŝkapti trutojn, ĉu mi ĝenis min por doni al vi libertempon ?... »

Tiam de iu afero ĝis alia, Sro Hamelo ekparolis al ni pri la franca lingvo, dirante ke ĝi estas la plej bela en la mondo, la plej klara, la plej solida: ke necesas gardi ĝin inter ni, kaj neniam forgesi ĝin, ĉar kiam popolo falas en la sklavecon, tiam longe ĝi tenos sian lingvon, estas kiel se ĝi tenos la ŝlosilon de sia malliberejo... Poste li prenis gramatikan libron, kaj legis al ni la lecionon. Mi mirigis konstati kiel mi komprenis. La tuto kiun li diris ŝajnis al mi facila, facila. Sed mi ankaŭ kredas ke mi neniam estis tiel bone aŭskultinta, kaj ke li ankaŭ neniam estis tiom paciencema al siaj klarigoj. Oni estus dirinta ke antaŭ ol foriri, la kompatinda homo volis doni al ni sian tutan sciadon, unufoje enirigi ĝin en la kapon.

La leciono finita, oni daŭrigis per la skribo. Por tiu tago, Sro Hamelo estis pretiginta tute novajn ekzemplojn, sur kiuj estis skribita per

